

La celoj de la Eŭropa Komunumo

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 615-96-2, 1982 septembro 02 kaj 04

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1982-96/SRI-1982-96-2-615-Claude-kaj-Andree-GACOND-La-celoj-de-la-Europa-Komunumo.mp3>

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond nome de Svisa Radio Internacia

La pasintan semajnon ni raportis pri la formiĝo kaj rapida kresko de la Eŭropa Komunumo, kies membroŝtato ne estas Svislando. Tio ne malhelpis Kulturan Centron Esperantistan en La Chaux-de-Fonds malfermi la ĉisomeran kurssesion de sia Internacia Feria Altlernejo per Studa Semajnfino ĝuste dediĉita al la formiĝo de Eŭropo. Rezultis el tiu seminario dika raporto, kiun vi povas ricevi, skribante al Svisa Radio Internacia. El ĝi ni ĉerpas la hodiaŭajn citaĵojn pri la celoj de la Eŭropa Komunumo.

A.- La tri traktatoj de 1951 kaj 1957, kiuj formas la bazon de la Eŭropa Komunumo, restas ties inspiro kaj daŭre alcelas ankoraŭ ne atingitajn vojojn. Jam la Eŭropa Komunumo por Karbo kaj Ŝtalo celis al ekonomia ekspansio, al kresko de laboreblecoj kaj al plialtiganta vivnivelo en la membroŝtatoj.

Cl.- En la Roma Traktato, fundamento de la Ekonomia Komunumo, oni estis eĉ pli ambicia. Indas citi el la antaŭparolo el tiu traktato de 1957:

A.- La ses Membroŝtatoj...

Cl.- "Decidintaj, konstrui la fundamenton de ĉiam kreskanta unuiĝo inter la popoloj de Eŭropo;

A.- "Decidintaj, certigi la ekonomian kaj socian progreson de siaj landoj per komuna agado por forigi la barilojn kiuj dividas Eŭropon;

Cl.- "Jesintaj kiel esencan celon de siaj klopodoj la daŭran plibonigon de la viv- kaj labor-kondiĉoj de siaj popoloj;

A.- "Agnoskintaj, ke la forigo de ekzistantaj obstakloj postulas bone planitan agadon por garantii stabilan ekspansion, ekvilibran komercon kaj justan konkurencon;

Cl.- Dezirantaj fortigi la unuecon de siaj ekonomioj kaj certigi ilian harmonian evoluon, forigante la diferencojn kiuj ekzistas inter la diversaj regionoj kaj la malprosperon de la malpli riĉaj regionoj;

A.- "Volantaj kontribui per komuna komerca politiko, al la progresiva abolo de malhelpoj en internacia komerco;

Cl.- "Intencantaj konfirmi la solidarecon kiu ligas Eŭropon kaj ekstereŭropajn landojn kaj dezirantaj certigi la evoluon de ilia prospero, laŭ la Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj;

A.- "Decidantaj per tia komunigo de siaj rimedoj, konservi kaj plifortigi pacon kaj liberecon, kaj vokantaj al aliaj popoloj en Eŭropo kiuj kunhavas tian idealon, aliĝi al tiuj klopodoj;

C1.- "Decidas krei Eŭropan Komunumon kaj tiucele nomis jenajn plenrajtigitojn..."

A.- Jen do tuta programo, kiu orientis Eŭropon en kunlaboran eraon. La traktato mem klarigas, kiel tiuj celoj atingiĝos: per doganunuiĝo kaj per la libera movo de varoj inter la Membroŝtatoj, per malmuntado de kvotoj kaj malhelpiloj al ĉia komerco, kaj per la libera movo de personoj, servoj kaj kapitalo.

Cl.- Krome la traktato de Romo provizas kelkajn komunajn politikojn - agrikulturo, transporto, konkurenco, harmoniigo de leĝoj, socia politiko, ekstera komerco, ktp.

A.- Kaj la traktato ankaŭ permesas al la Komunumo la starigon de politikaj projektoj, eĉ se ili ne estas specife menciitaj en la traktato, kondiĉe ke ili montriĝas necesaj por atingi la ĝeneralajn celojn de la traktato.

C1.- Estas notinde, ke la tri traktatoj, kiuj formas la bazon de la Eŭropa Komunumo, ĝenerale silentas pri ekonomia kaj mona politiko, ĉar en la relative prosperaj kvindekaj jaroj oni konsideris progreson sur tiu ĉi kampo kiel preskaŭ aŭtomata.

A.- La atingo de la celoj de la Komunumo kuŝas en la manoj de kvar diversaj instancoj, la Konsilio de Ministroj aŭ tutsimpie la Konsilio, la Komisiono, la Kortumo kaj la Parlamento.

Cl.- Krome du aliaj organizoj kunhelpas: la Kortumo pri revizio kaj la Ekonomia kaj Socia Komitato. La Konsilio kunvenas en Bruselo kaj Luksemburgo. La Komisiono havas siajn oficejojn kaj kunvenojn ankaŭ en tiuj du urboj. La Kortumo sidas en Luksemburgo, dum la Parlamento kunvenas en Strasburgo (plena sesio) aŭ Bruselo (komitatoj), sed ĝiaj oficejoj troviĝas en Luksemburgo. En tiu urbo ankaŭ troviĝas la Kortumo pri Revizio, dum la Ekonomia kaj Socia Komitato kunsidas en Bruselo.

A.- La Konsilio de Ministroj havas la plej vastan decidpovon koncerne la komunuman politikon. Ĝi konsistas el tiuj membroŝtataj ministroj kies oficoj korespondas al la temo decidota. Tiel la agrikultur-ministroj respondecas por komunuma asrikulturo, la transport-ministroj por transporto ktp.

Cl.- La Konsilio de Eksterpolitikaj Ministroj, kiu respondecas pri ekstera politiko kaj ĝeneralaj aferoj, funkcias kiel kunordigilo. Krom la 10 ministroj (po unu por ĉiu membroŝtato) partoprenas ankaŭ en la laboro de la Konsilio la Korepero, mallonga formo de "Komitato de Permanentaj Reprezentantoj", kiu grupigas ambasadorojn de la membroŝtatoj al la Komunumo kaj kies tasko estas la preparo de la laboro de la Konsilio.

A.- La laboro de la Konsilio estas baze decidi pri la efektivigado de la proponoj de la Komisiono de la Eŭropa Komunumo, post ekvilibra diskuto kaj dialogo kun la Komisiono mem.

Cl.- Tiu dialogo estas la esenca fenomeno en la decidproceduro de la Eŭropa Komunumo. Kaj, ĉar la Komisiono preparas la proponojn, la Konsilio kutime povas decidi nur sur la bazo de Komisiona propono.

A.- Kiam la Konsilio decidas pri tia propono, plimulta decido eblas, sed tamen depost la tiel nomita Luksemburga Kompromiso de 1966, unuanima decido necesas "kiam la esencaj interesoj de iu Membroŝtato" postulas ĝin.

Cl.- Ankaŭ, se la Konsilio deziras ŝanĝi la proponon de la Komisiono aŭ eĉ tute kontraŭi ĝin, unuanima decido inter la 10 ministroj necesas.

A.- Ĉio tio volas-dir, ke kvankam plimulta decido eblas, pri ĉiu grava temo unuanima decido estas bezonata.

Cl.- La venontan semajnon ni priskribos la funkciadon de la Komisiono kaj de la aliaj institucioj de la Eŭropa Komunumo. Eble kelkaj aŭskultantoj ricevis la impreson, ke ĉio tio estas tre komplika. Povas esti, sed almenaŭ tiu organizo estas ege demokrata, kaj tio estas tutcerte ege profitiga por Okcidenta Eŭropo. Neniu ŝtato povas trudi sian volon al la ceteraj, kaj neniuj decidoj povas esti prenita kontraŭ la publikaj opinioj en la membroŝtatoj.

A.- La Eŭropa Komunumo kapablis doni al si originalajn instituciojn, kiuj tre kontentige funkcias, el tio ĝia rapida progreso.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!

Kopirajto © Claude GACOND www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), junio 2014